3-a Jaro - N-o 13 - Julio 1948 — BULLETIN INTÉRIEUR — Prezo : 6 fr. frankoj

Kongresantoj de Amsterdam. Saluton !

# SENŜTATANO

Informilo de
TUTMONDAJ LIBERECANAJ ESPERANTISTOJ

Junulo, konkeru vi mem, vian liberon, kaj vi povos ĝui ĝin.

REDAKTEJO KAJ ADMINISTREJO :
(Provizore) E. VIVANCOS, 25, chemin de La Courneuve,
Drancy (Seine), Francio

JARABONO (10 NUMEROJ) :
Franclando . . . . . . . . . . . . 60 fr. frankoj
Aliaj landoj : 70 frankoj aŭ 7 respondkuponoj

# PRI NIA TASKO

> Neniu povas fari pli ol kiom la cirkonstancoj kaj lia situacio permesas. Nur tiu kulpas, kiu *forgesas* pri sia devoplenumo en la vivo.
>
> (El *Sur Sanga Tero*, de J. BAGHY.)

Preskaŭ unu jaro pasis depost la S.A.T.-Kongreso en Aarhus. Multe okazis. La mondo ne unuiĝis, sed pli kaj pli dividiĝis en du blokojn. La politika firmamento nebuliĝis. Ĉiutage ni renkontas la altrudon de la ŝtato. La ŝtato anstataŭas la ĉielan dion. Milionoj da homoj apoteozas ĝin, nekomprenante, ke ili fariĝos viktimoj de siaj propraj imagoj.

Evidentiĝas, ke la mondo kuras al nova katastrofo. Kvankam jarcento da porsocialisma propagando pasis, tamen la laboristaro estas pli katenita ol antaŭe. En ĉiu striko dum la lasta tempo, la ŝtato montris sian fizionomion. Montriĝis ĝia vera intenco, defendi la monŝrankon de la posedantaro. Babilaĉado de politikaj bonzoj ne povas nei tion.

La okcidentaj landoj rekonkeris demokratan liberecon, sed la vivnivelo de la laboristaro estas malbona. Paroli pri la orientaj landoj — situantaj malantaŭ la t. n. fera kurteno — mi ne kapablas. Mankas la *korespondado kun tieaj kamaradoj*. Sed la malpermeso de perletera rilato kun translimaj samsortanoj, pruvas, ke la situacio tiea ne estas multe pli bona ol en la okcidentaj paradizoj. Ĉar ŝtatistoj ŝatas distrumpetadon pri la bono de siaj reĝimoj. Sekve ni rajtas konjekti, ke, kvankam povas ekzisti iugrada diferenco, tamen ĉie la vorto « laboristo » estas ekvivalenta al « sklavo ». Laboristoj disponas pri certaj liberecoj, sed se la ŝtato ordonas, ili rajtas nur mortaĉiĝi en porpatria batalo kaj ne plu.

En la estinteco la ŝtatistoj penadis kaj en la estonteco ili penados kredigi al ni, ke estas utile por laboristoj partopreni en tia batalo. Konstatante la rezultatojn de la lastokazinta milito, ni ne bezonas paroli plu pri tiaj mistifikaĵoj. Estas kompreneble, ke la denove rimarkeblaj militpreparoj nin tre afliktas. Kien ajn ni rigardas, ĉie ni perceptas plifortigon de la perforto. Ni vivas en kvazaŭa frenezulejo. Torentas la politika propagando. Ŝajne ekzistas du internacioj, sed esence tiuj konverĝas. Ambaŭ aspiras konkeron de la ŝtato, neglektante la edukon de la laboristaro. Tasko de la laboristaro estas kontraŭi la militon. Tamen la politikistoj nenion faras koncerne porpacan batalon.

Tiuj scias nur babilaĉi pri rekonstruo de la nacioj k. t. p., asertante ke la patrio malriĉas. Pri la riĉuloj ili silentas. Pasintan jaron, la 9-an de aŭgusto, United Press publikigis la jenan taksaĵon pri la grandaj privataj posedaĵoj en la mondo :

| | |
|---|---|
| Hindio : | |
| Nizam Hyderabad | $ 3.000.000.000 |
| Maharadjah Gaek-kwar Baroda .. | 280.000.000 |
| Britio : | |
| Sir John Ellerman | 150.000.000 |
| La Duko de Wesminster ....... | 120.000.000 |
| Hispanio : | |
| Juan March .... | 120.000.000 |
| Nederlando : | |
| La reĝino Wilhelmina ......... | 175.000.000 |
| Daniel van Beuningen ........ | 30.000.000 |
| Svisio : | |
| Emil Georg Beuhrle | 15.000.000 |
| Irlando : | |
| Joseph Mc Grath.. | 5.000.000 |
| Usono : | |
| Henry Ford II... | 1.000.000.000 |
| John D. Rockefeller ........... | 600.000.000 |
| Pierre du Pont .. | 3.500.000.000 |

Jen estas la dolaruloj, kiuj ŝatas paroli pri amo al la proksimulo. Milionojn oni elspezas por militpreparo, sed por konstruo de justa socio ne estas mono. Super ĉio ŝvebas la eklezio, partoprenante en la ekspluatado. Konsiderante la aferon, ni konscias pri nia tasko, klarigi al la laboristoj la mensogojn. Instrui al ili ne kredi la parazitojn, portantajn ĉu ruĝan aŭ nigran mantelojn. Meze de la uragano ni staras, konsciante, ke nur la agado de la laboristaro mem kapablas haltigi ekspluategon kaj subpremon. Bedaŭrinde ni estas ankoraŭ malmultaj. La rimedoj, pri kiuj ni disponas, estas etaj. Kvankam la cirkonstancoj ne favoris al ni, tamen ni faris laŭpove. Jen konciza skizo pri nia laboro.

Dum la S.A.T.-kongreso en Aarhus ni frakcikunvenis. Priparolante la taskon farendan, ni unuanime akceptis la proponon, provizore uzi Senŝtatanon por konigi per ĝi nian opinion pri la porsocialisma batalo. Tre gravaj estis la malfacilaĵoj, renkontitaj dum la pasinta jaro. Tamen, dank' al la persisto de niaj parizaj k-doj, nia gazeto aperis, kvankam tiu aperado estis anemia. La k-doj faris ĉion eblan. Ne nur la aperigo estis malfacila, ankaŭ la ekspedo de la gazeto estas vera diablaĵo. Laŭ diversaj kromvojoj Senŝtatano atingis tiujn k-dojn, loĝantajn en regionoj, kie la libereco estis sufokata. Al ĉiu informpetinto ni sendis ekzempleron de nia organo, aŭ letere ni klarigis pri nia aspiro. Pro la konataj monbaroj, multaj k-doj ne povas pagi la abonon. Jen k-doj, komprenu bone, ni ne fieras pri la farita laboro, sed espereble la situacio baldaŭ sereniĝos. Kaj povas esti, ke ni refoje staros antaŭ alternativo. Tamen provizore ni disponas pri iom da libero.

Ni utiligu ĝin k-doj ! Ĉiu agu laŭ kapablo ! Kiam vi partoprenas en la S.A.T.-kongreso, vi nepre vizitu nian frakcikunvenon ! Kune ni priparolos nian taskon. Por ke ni povu doni, en tiu frakcikunveno, klaran bildon pri la ĝenerala deziro de niaj k-doj, ni petas vin sciigi al ni pri viaj sugestoj. Skribu al nia sidejo. Agu k-do kontraŭ mensogado, kontraŭ subpremo ! For la ŝtato ! Vivu liberecana socio ! Ĝis revido en Amsterdam.

ADRIANO.

# FOR LA MILITON !



**Bilanco de la dua mondmilito**

| | |
|---|---|
| 14 milionoj | mortintoj en la batalfrontoj. |
| 3 milionoj | civiluloj mortigitaj pro militaj okazaĵoj. |
| 11 milionoj | pereis en la faŝistaj koncentrejoj. |
| 30 milionoj | soldatoj fariĝis invalidoj. |
| 6 milionoj | ekzekutitoj. |
| 26 milionoj | senhejmiĝintoj. |
| 20 milionoj | militkaptitoj. |
| 70 milionoj | forpelitoj. |
| 192 milionoj | militviktimoj. |

**FOR LA MILITON !**

# KIO OKASIS EN HISPANIO DE 1936-39

En 1936 mi akceptis inviton al Barcelono por paroladi tie dum kunveno okazonta en la granda areno de l' katalunja ĉefurbo. Komence de julio 36 mi alvenis en Barcelono; la kunveno devis esti okazonta la 15-an. La mitingo tamen ne okazis. Famoj pri venonta ribeloprovo de l' generalo Franco k de multnombraj pli altaj oficiroj de l' hispana armeo lasis timi, ke mitingo de ĉ. 40.000 revoluciaj laboristoj en la areno estus bonvena celobjekto por la generaloj Goded k Batet, la kunligitoj de Franco en Barcelono, ĉar de la montetoj Montruich k Pedralbes (ĉirkaŭantaj Barcelonon). kie troviĝas la militistaj kazernoj, oni tre facile povus esti bombardinta k eksterminta la amasiĝintajn laboristojn.

Anstataŭ aranĝi la kunvenon la barcelonaj sindikatoj sub gvidado de l' anarkiistoj preparis la armitan defendon kontraŭ la venonta provokaĵo. La duan julisemajnon 1936 la sindikatejoj barcelonaj estis transformitaj en distriktejoj de l' revoluciaj defendkomitatoj.

Febrece la anarko-sindikalista Barcelono preparis sin rifuzi la faŝistan atakon. La situacio similis al ti-kiu ekestis someron 1932 en Berlino, kiam Papen (la tiama regna kanceliero germania) deklaris eksigita la prusan registaron. Sed la komparo rilatas nur al la objektiva stato. La psikologia stato estis tute alia : Dum la berlina sindikat-kartelo restis malaktiva, eĉ ne riskis proklami la ĝeneralstrikon k deklaris kontraŭ-konstitucia la memagadon de la laboristoj, la loka federacio de l barcelonaj sindikatoj transprenis senhezite la gvidadon de l' revolucia defendado, armis la laboristojn plejeble bone, ellaboris ĝeneralstrikajn alvokojn, organizis la konstruadon de barikadoj, starigis bataltrupetojn konsistantajn tutkomprene el volontuloj k preparis sin ĉiurilate ekpreni la batalon *kontraŭ bonege armita k militiste organizita malamiko.*

Dum la nokto al la 19-a de julio, estis sabata vespero, ni restis en la sindikatejoj; la ataktrupetoj iris en la antaŭurbojn por starigi barikadojn, k la malmultaj kamaradoj, kiuj perforte estis havigintaj al si pafilojn, ekprenis siajn poziciojn. Nokte je la tria la reakciaj generaloj foriris el siaj kazernoj por okupi la urbon.

Ni estis atendintaj ilin, k ili estis akceptataj laŭmerite. La batalo daŭris kvar tagojn. La laboristoj posedis nur malmultajn pafilojn k revolverojn; la faŝistoj disponis pri maŝinpafiloj, kanonoj, tankoj k eĉ aviadiloj. Sed la batalemo de la laboristoj rompis la superecon de l' faŝistoj. Jaŭdon la batalo finiĝis.

Ne timantaj la morton la anarkiistoj venkakiris la faŝistajn armilojn. La akiritaj armiloj servis al la okupado de l' kazernoj k de l' strategiaj konstruaĵoj, kiujn posedis la militistaj ribelprovintoj. Barcelono estis posedo de l' venkintaj C.N.T. (anarko-sindikalista organizaĵo) k F.A.I. (anarkiista federacio iberia).

La loka federacio de l' sindikatoj decidis nun ĉesigi la ĝeneralstrikon k denove ekpreni la produktadon, sed laŭ novaj kondiĉoj. La privatposedantoj estis eksproprìitaj, se ili apartenis al la faŝistoj. Demokratemaj posedantoj deklaris adapti sin al la nova tempo k transdonis siajn produktejojn al la laboristoj.

Ĉiuj transportiloj estis kolektivigataj k gvidataj de la laboristoj. Anstataŭ la komencliteroj de l' kapitalista privatsocieto estis metataj la komencliteroj de l' C.N.T. sur la tramojn, aŭtobusojn k subteran tramon. Same la fabrikejoj estis transprenataj de la laboristoj k gvidataj de l' urba sindikat-konsilantaro.

La kolektiviĝo sin etendis sur ĉiuj fakoj de l' ekonomia vivo. La domoj estis submetataj sub la konstrulaborista sindikato; la lakto- k pano-provizado estis tasko de la sindikato de l' nutraĵ-industrio. La haveno de Barcelono kun ĝia ampleksa trafiko kontrolis la havenlaborista sindikato. En la teksaĵfabrikoj la personaro laboris gvidata de l' memelektitaj sindikat-delegitoj, k ofte troviĝis en la organizaĵa komitato la iamaj posedantoj, kiuj nun ne plu enkasigis profitojn, sed perlaboris sian salajron.

Eĉ la frizejoj, la kinomatografaj teatroj k la restoracioj k.t.p. estis kolektivigataj. Iom post iom la kolektiviĝo iĝis sociiĝo, t. e. la kolektivigitaj produktejoj de l' unuopaj industrioj formis unuecan produktad-organizaĵon, kiu estis nomata sociigita industrio. Projektoj estis ellaborataj por la starigo de por-laborista banko bazanta sur la ideoj de Proudhon pri la interŝanĝ-banko, kiu devis gvidi la ekonomiajn fortojn en samcentrigitajn kanalojn.

Tiu ĉi sociala transformiĝo ne limigis sin sur Barcelono, sed etendiĝis sur tutan Katalunjon k ankaŭ sur la ceteran Hispanion, kie la laboristoj estis triumfintaj super la faŝistoj.

Tre interesa estis la sociala aliiĝo en la vilaĝoj k kampoj. La grandposedaĵo estis eksproprìigata, k per tio fine estis realigata la jam delonge sopirata agrara reformo, kiun eĉ la respublika registaro ne estis riskinta plenumi.

La malgrandaj kamparanoj kuniĝis al kolektiva mastrumado; la kolektivoj de l' unuopaj lokoj aniĝis al sia provinca federacio. La privata posedaĵo je tereno aliĝis al kolektiva. Sed ĉio ĉi tio ekestis libervola.

*Mi* estas farinta plurajn vojaĝojn tra la tuta respublika Hispanio k estas skribinta du librojn pri la sociala transformiĝo. La rusaj kolektivoj (kolĥosoj), kiujn mi vidis 1920 en la diversaj partoj de Rusio, restis tre malantaŭe post la hispaniaj kolektivoj de 1936. Precipe karakterize estis, ke ne nur la anarkiistoj k sindikalistoj, sed ankaŭ la respublikanoj — en Andaluzio ekz. la anoj de l' burĝeca Respublikana Unio — fondis « Cortijos colectivos », t. e. kolektivoj.

Estis ja la kutimo de l' pasanta tempo K en Hispanio vivadas ekde la epoko de « los Comuneros », t. e. depost Karlo V., do depost la 16-a jarcento, la spirito por la komunumo, por la « Colectividad ». La anarkiismo en Hispanio estas malpli doktrino veninta el eksterlando, sed la daŭrigado de malnovaj federaciaj k komunumaj tradicioj.

Kiel oni ja scias, la hispanoj estis reprezentantaj la kolektivismon jam dum la fondiĝo de l' Unua Internacio. La fondiĝo de kolektiv-societoj sur libervola bazo estas politika ago, tendenco al komuneco, al komuna laboro k al kontentiga disdonado de ĉiuj laborproduktaĵoj.

Ĝi estas la kontraŭo al la nura eksproprìigo plenumita dum la Granda Franca Revolucio k komence ankaŭ en Rusio 1917; eksproprìiĝo, kiu laŭ sociala vidpunkto estas negativa k montras nur malmultajn pozitivajn aspektojn. Kiam mi konsideras la socialajn aliiĝojn, kiujn mi mem povis observi k esplori dum la lastaj tridek jaroj en la diversaj landoj, tiam mi estas devigata deklari, ke la socialisma idealo estas efektivigata nur en Hispanio laŭ ĝia origina k pura formo.

La unuajn semajnojn la registaro estis kvazaŭ fantomo; la vera potenco estis en la manoj de l' kontraŭ-faŝistaj milicoj, inter kiuj la C.N.T.k.-F.A.I. estis gvidantaj.

La registaro en Katalunjo kiel ankaŭ tiu en Madrido akceptis poste la C.N.T.-on k F.A.I.-on; la reformoj k aliiĝoj plenumitaj de la kampuloj k laboristoj komence de la revolucio (k estis fakte sociala revolucio, kiu ekestis post malvenko de la ribelprovintoj!) estis leĝe akceptataj. En Katalunjo la kolektiviĝo estis leĝe difinita en la konstitucio; en l' aliaj partoj de Hispanio oni poste iris la saman vojon.

Dum la du k duona jaroj de l' enlanda milito fariĝis fundamenta ŝanĝo en la socialaj interrilatoj de la homoj interne de la respublika parto de Hispanio. La lando estis sendube survoje al nova sociala ordo. Bedaŭrinde ĉi evoluo estis subite interrompata pro la venko de Franco.

La militista malvenko de l' respubliko iĝis neevitebla, ĉar la respubliko estis lasita sola de ĉiuj siaj amikoj, dum Franco estis militiste subtenita de Musolini k Hitler. Por la diktatoroj de Italio k Germanio la hispania enlanda milito estis eksperimento al la preparado de l' venonta tutmonda milito.

A. SOUCHY.

# AL LA REVOLUCIULOJ

Vi, revoluciuloj de ĉiuj ideoj, kiuj volas aliigi la mondon, unuj ĉar la mizero vin regas, aliaj ĉar malgraŭ sia bona pozicio sentas en kerno la ĉagrenon de siaj similuloj, vi ambaŭ kiuj celas ŝanĝi la estantan vivmanieron tiel kontraŭnaturan en kiu ni vivas k alvokas ĉiuj malmoderajn ilojn celante konkeri la liberon de la viro al la viro.

Ĉu vi jam komencis la verkon en vi mem? Ĉu vi jam liberiĝis de via propra sklaveco? Ĉu vi mem jam ekzempligis ke ni povas vivi sen leĝoj k sen mastroj? Ĉu vi jam forpelis la perforton de via loko uzatan kontraŭ viaj kunulinoj k infanoj? Ĉu vi lernis uzi la logikan racion anstataŭ la pugnan racion? Ĉu vi ne plu fidiskutas kun viaj mizeraj fratoj k verkas viajn aferojn raciante. Ĉu vi estas vere certaj ke vi povas esti liberaj? Ĉu vi jam liberiĝis de la sklaveco de la difekta k abomeninda cigaredo k de la venena alkoholo? Ĉu vi ne plu ludas vian mizeran salajron k forlasas la kismologiajn lokojn de la kafejo?

Rememoru ke saĝa homo iam diris : « Sola tiu, kiu tagon post tago konkeras sian sanan liberon indas ĝui ĝin. »

Estas facile postuli al la aliaj tion, kion ili havas aŭ devas doni, tamen estas nepre malfacile postuli de ni mem la plenumon de niaj devoj, unue por ni mem k poste por niaj similuloj.

Pensu, ke renversante la politikan flankon de la socio vi malmulton sukcesos se vi samtempe ne renversos ĝian moralan flankon.

La leĝaro estas la fidela spegulo de niaj gvidantoj, tial via estonta socio, estonte gvidata de vi mem, estos ankaŭ la fidela spegulo de via morala supereco.

Tamen, oni ĉagrene konstatas ke la plimulto de tiuj, kiuj deziregas la liberon, vivas en la infero de la difekto, vi estas sklavoj de la cigaredo, de la alkoholo, de la ludkartaro, de la vetkuroj, de la loterio, de la bordeloj, de la teo, de la ordona seksismo, k.t.p. k kun tiuj ĉi malbonajoj de la estanta malmorala k kontraŭnatura socio, vi estante sklavoj de vi mem, vi kuraĝas paroli pri libero, kiam vi ankoraŭ ne povis liberiĝi de via propra sklaviĝo!

Estu veraj revoluciuloj; komencu la revolucion en vi mem.

Faru la revolucion unue en viaj moroj k en viaj malbonajoj.

Pensu ke la vera moralo devas komenci en via hejmo.

Ne lasu por morgaŭ tion, kion vi povas fari hodiaŭ. Donu hodiaŭ la ekzemplon de supera estonto. Unuvorte : ne estu parolema revoluciulo, estu tia per faktoj, per ĉio, kio povos estiĝi vin tiel.

Kiam vi estos liberigitaj de ĉiuj viaj malvirtoj k pasioj k formetos for de via tablo tiujn stumpojn de viaj fratoj malsuperaj en la evolua skalo, la bestoj, k manĝos sen krime, oni agnoskos al vi la rajton postuli de la aliaj la restajon de via socia bonstato.

Memoru ke via estonta bonstato estos malvera se vi ne turniĝos al la Naturo, kio estas la sola maniero liberigi nin de la socia sufero, de la fizika k morala doloro.

D-ro JOSE DE CASTRO.

# LA "DEMOKRATIO" EN BULGARIO

En Bulgario ni havas « Orientan Demokration » t. e. diktatoreca aŭ pure bolŝevika potenco. La tuta socia kaj politika vivo estas en la manoj de la komunista malplimulto. Ne estas permesata kia ajn memstara kaj opozicia politika agado. La ekzistanta reganta politika kombinajo el kvin partioj, sur kiuj dominas la bolŝevikoj, nun aliiĝis en unuiĝa politika ŝtata partio, en kiu la tuta estrara aparato estas en la mano de komunistoj. Gegi Dimitrov, registarestro, estas la prezidanto de la nova ŝtata partio, kaj lia bofilo, sekretario de la komunistoj, estas ankaŭ sekretario de l' unuiĝa ŝtata partio konata sub la nomo « Patrolanda fronto ».

Ĉiuj anoj de la kvin partioj estas devigataj, sub timo de teruraj persekutoj kaj eksigo de laboro, partopreni novan ŝtatan partion, kiu estas nur masko de la komunista partio, entute akceptinte ĝian programon. En tiel kreita ŝtata-partio membras devige kaj kolektive : Laborista Profesia Ligo, Ligo de Virinaj Societoj, Terkulturista Ligo, Ligo de Popola Junulara, kaj aliaj. Ĉiuj menciitaj organizaĵoj estis « unuigitaj » laŭ la klasika bolŝevika sistemo, la devigo.

En ĉi-tiu politika reorganizo, la popolo estas nur vokita por aprobi la finitaj faktoj, kaj sankciigi per muntitaj orkonitaj mitingoj kaj malsekreta voĉdono sian plenteruran sklavigon.

La ekonomia situacio daŭre malboniĝas. Ĉi tie, krom la milito kaj la du sekecaj jaroj, falas la granda kulpo al la ĝenerala politiko de la registaro. Ĝi, per diversaj agoj, paralizas memstaragemon kaj iniciaton de laboranta popolo, per ŝtatigo de la ekstera kaj interna komerco, per nesukcesaj kaj abomenaj normoj, per barado de la agado de grave antaŭa disvolvita kooperativa movado, per transdono en la manoj de nelertaj ŝtataj burokratoj, de la ŝtatigitaj industriaj entreprenoj, k. t. p. La registaro estas kulpa por la ekonomiaj malordoj, ĉar ĝi subtenas unuflankajn komercajn rilatojn, ĉefe kun Sovetio, kiu pagas niajn produktojn malkare, kaj vendas siajn tre kare. Ĉi politiko senigas nian landon de multaj grudaj materialoj kaj industriaj produktoj de okcidentaj landoj.

La eksterlanda politiko de la registaro ne estas politiko de bulgara popolo, kiu volas pacon kaj restarigon, sed politiko de fremdaj fiservistoj kaj agentoj venintaj el Moskvo. Tio ĉi kondukas nin senevite al nova milito kaj katastrofo. Tial 90 % de laboristoj, vilaĝanoj, oficistoj kaj intelektuloj estas malkontentaj. Tial la malliberejoj pleniĝas de homoj; miloj da laboristoj, veraj kontraŭfaŝistoj pereas en koncentrejoj, devigataj labori sub terura reĝimo. Tial la registaro, depost kvar jaroj ne kuraĝas okazigi balotojn por komunumaj konsilantaroj.

Tia estas nia « orienta demokratio ». Per ĝi, nia popolo elvivas unu iluzion. la iluzio de malvera komunismo.

Karaj gelaboristoj el tuta mondo, karaj honestaj homoj, jen la vero.

Ni preferu la demokration (nek okcidenta, nek orienta) antaŭ la diktaturo; ni preferu la veran liberecanan komunismon antaŭ la demokratio!

KONSCIAJ LABORISTOJ (Bulgario).

## 21-a KONGRESO DE S.A.T. EN AMSTERDAMO

### Kunveno de la Anarkista Frakcio

De la 31-a de julio al la 5-a de aŭgusto 1948, okazos en Amsterdamo la 21-a Kongreso de S.A.T.

Por ĉiuj informoj skribu al la adreso de O.K.K. :

Sekretariino : H. Oudenhoocen, Bishoff, Bestevaerstraat, 127.

Kasisto : B. Bultemeyer, Jan van Galenstraat 86, Amsterdam.

Ni informas al ĉiuj anarkistoj ĉeestontaj la Kongreson, ke okazos aparta kunveno de la Anarkista Frakcio en S.A.T.

Pristudu jam de nun ĉiujn aferojn koncernante la anarkistan movadon, kaj alportu plej baldaŭ kiel eble viajn sugestojn al la sekretario de la A.F. : K-do A. Breddels, Koningstraat 481-v, Hago (Nederlando).

## NIAJ PERANTOJ

*Svedio :* Hartvig Johansson, Haga Nygatan 7-9, Göteborg.

*Nederlando :* Ad. Smit, Nw. Herengr. 35, Amsterdam (C).

*Aŭstrio :* Leopold Spitzegger, Wien 15, Wurmserg 45.

*Brazilio :* Roberto das Neves, Esperanto Klubo de K.A.J., C.P. 254, Rio de Janeiro.

*Argentinio :* Juan Sabaté, Gazcon 1454, Buenos Aires.

*Uruquajo :* E.A. de Rodriguez Prusia 1963, Cerro, Montevideo.

*Palestino :* Cha Fei Ho, P.O. B 2171, Haïfa, Naĥla-Branch.

*Germanio:* Joseph Reichert, Mannheim, Jungbruschstr. 38.

*Polio :* Stefan Rostanice, Piotrowska 70-2, Lodz.

*Francio : Albert Grillat, 24,* rue de la Grange-aux-*Belles, Paris-10e.*

*Portugalio :* Antonio Ferreira, Casal da Junqueira, Ladeira da Cepa, Correio dos Carreiros, Caldas da Rainha.

## KORESPONDADO

K-ino Africa Sanchez Garcia, 7, rue de l'Ascension, Guéret (Creuse), Francio, nova esperantistino, deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj.

Franlišek Koral, Ještědská 92, *Liberec VIII* Ĉekoslovakio, deziras korespondi kaj interŝanĝi librojn kun ĉiulandaj gesamideanoj.

## Sennacieca Esperantista Unio de Senŝtatanaj Naturistoj

Ĉiuj senŝtatanaj naturistoj kiuj volu entrepreni fondadon de « Sennacieca Esperantista Unio de Senŝtatanaj Naturistoj » bonvolu sin turni al K-do Antonio *Ferreira, Casal da Junqueira,* Ladeira da Cêpa, Correio dos Carreiros, Caldas da Rainha (Portugalio).

## SENŜTATANOJ HELPAS SENŜTATANON

| | fr. fr. |
|---|---|
| Gomez | 40 |
| Chavenon | 40 |
| Parmentier | 500 |
| Faugières | 200 |
| Celma | 100 |
| Cacho | 90 |
| Levreaud | 40 |
| Thierriat | 40 |
| | sv. kr. |
| Esperanto Anark. Grupo Stockholm. | 5 |
| Edith kaj Hartvig | 3 |

## Ilustrita Poŝtkarto « For la militon »

*Eldono de « Senŝtatano »*

Gekamaradoj : Helpu nin kaj propagandu kontraŭ la milito akirante niajn ilustritajn poŝtkartojn.

Prezo po unu ekzemplero : 5 francaj frankoj, aŭ 3 ekzempleroj po 1 respondkupono.

*Homo kiu unuiĝis kun la estulo de l' universo*

# MAHATMA GANDHI

Mohandas Karamchand Gandhi naskiĝis la 2-an de oktobro 1869 apud la Oman golfo en Kathivar en la duonsendependa ŝtateto de Porbandar, « la blanka urbo ». Lia familio apartenis al la kasto de l' « Bania » (vendistoj) kaj komence estis spicistoj, sed tri el ili estis ĉefministroj de diversaj provincoj. Lia patro, interalie, estis ministro en la provinco de Porbandar kaj poste en Rajkoot kaj Vankaner. Li unue vizitis publikan lernejon, poste Anglan gimnazion kaj fine la universitaton de Ahmedabad.

Lia patrino instruis al li Hindan piecon kaj amo-leĝon de la « Ĝajna » sekto, kiu rifuzas mortigi iun ajn estulon eĉ insekton. Oni edziĝis lin, kiam li estis nur 12 jara. Sed tiu edziĝo, kiu ŝajnas al ni tro frua, favore feliĉigis lin, kaj lia edzino restis bona kunulino dum ĉiaj travivaĵoj (Ŝi mortis dum la lasta milito). Estante 19 jara, Gandhi vizitis Anglion en kiu post tri studjaroj li advokatiĝis. Post reveno Hindion, li precipe frekventis du homojn, kiuj grave lin influis; nome la « Parsi » Dadabahai, pioniron de Hindia naciismo kaj profesoron Gokhale, kiu instruis al li la « Neperfortecon ».

Ĉn 1893 li enŝipiĝas al Sud-Afriko por kontroli firmo-interesojn de Porbandar. En Durban kiel en Pretoria vivis grava Hinda kolonio, kiu estis viktimo pro ega rasa antaŭjuĝo. Gandhi konstatis, ke oni malpermesis al ili uzi la vagonarojn rezervitajn por Eŭropanoj. Oni eĉ forpelis lin el restoracioj kaj policanoj lin batis.

Unu jaron poste li sin preparis forlasi la landon, kiam nova dekreto forprenis al 12.000 Hindoj el Afriko la « Liberan civitanan rajton ». Li decidis prokrasti sian foriron por kontraŭstari tiun dekreton. Samepoke lu verko de Tolstoj (La reĝlando de Dio estas en vi) forte impresis lin. Li tuj elstudis la verkojn de Tolstoj. « ... Mi eksentis pli kaj pli la senlimajn eblojn de l' universala amo », li skribis en aŭtobiografio. Mitingoj kaj petskriboj ne malhelpas lin resti fidela al Britio.

Li starigas Hindan krucon dum la Boer-milito kaj vundul-portistan fakon en 1906 ĉe ribelo de l' Zuluoj. Kiel Tolstoj, kies amiko li estis, li predikas malŝatemon al riĉaĵoj, sin deklaras adepto de l' manlaboro kaj mem montras ekzemplon : Li forlasas advokatecon, plugas kaj manteksas. En 1904 en Phoenix apud Durban li starigas agro-kolonion laŭ planoj de Tolstoj. En 1906 por respondi al nova dekreto, Gandhi arigis milojn da Hindojn kaj Ĉinojn en Johanesburg kiuj juris rezisti sen uzo de perforteco.

Unuafoje Gandhi aplikis la idealon de la « Satjagraha », tio estas la trasereĉo kaj praktiko de l' vero. En 1914 Generalo Smuts cedis donante al Azianoj permeson loĝi en Natal kiel liberaj laboristoj. Venkinte, Gandhi reiris Hindion kun edzino kaj infanoj. Hinda popolo estis en plena evolucio. Rabindranath Tagore propagandis por nacia sendependo aŭ « Swaraj ». Nova nacia kanto : « Saluton patrio » (Bande mareram) grupigis manifestantojn. Ankoraŭfoje Gandhi oferis sian helpon al Brita registaro starigante Hindan fakon vundulportistaron. Li opiniis, ke la alianca venko okazigos la liberiĝon de la subpremataj popoloj. Ho ve! En 1919, la « Bill Rowlatt » restarigis la cenzuron de la sekreta polico. Hindio ribeliĝis.

En 1920, Gandhi sin metis ĉe la kapo de la Hinda movado. Tiuepoke, li verkas sentencon, kies efiko restis profunda ĝis hodiaŭ : « Se Hindio perforte agus, mi ne plu emus vivi en Hindio! Ĝi cesus inspiri al mi fierecon. »

### LA VERKO DE GANDHI EN HINDIO

La 6-an de aprilo 1919 estis sankta tago por Hindio. Gandhi organizis la unuan « Hartal » laborĉeson por protesti kontraŭ la « Bill Rowlatt » altrudante al Hindoj fasto-tagon, preĝadon kaj strikon. En Delhi, la « Hartal » senbridigis ribelojn kaj soldatoj alvokitaj vundis ribelantojn. Gandhi forveturis al Delhi sen permeso de l' registaro, sed oni malpermesis al li iron en la urbon. Li rifuzis obei, estis arestita kaj resendita al Bombay per speciala trajno. Kelkajn monatojn poste, la muzulmanoj protestis kontraŭ la starigo de la mandatoj de Palestinio kaj Sirio, kiu forprenis al Turkoj la kontrolon al la sanktaj lokoj de l' Islamo.

Kun granda surprizo de l' Angloj, Gandhi prezidis la konferencon de l' Kalifat en Delhi, starigente tiel la bazojn por la Hinda-Muzulmana repaciĝo. La unua kampanjo pri « Nekooperado » estis tuj subtenata de la tuta Hindio. Gandhi resendis la Anglajn ordenojn, kiujn li ricevis dum la antaŭaj militoj. Lia modereco, tamen ne ĉiam estis komprenata. Li predikis amon al kontraŭuloj. Li skribis sen ironie al Angloj : « Miaj karaj amikoj! » Li deklaras : « Mia religio malpermesas al mi ajnan inciteco kontraŭ vin. Eĉ se mi tion kapablus, mi ne emus vin frapi. Mi nur volas vin venki per mia sufero. »

Li organizas vastan kampanjon kontraŭ alkoholo kaj opio. Por sisteme kaj materie kontraŭstari la disvolviĝon de la Anglaj teksajoj, li honore restarigas la radŝpinilon kaj Hindan ŝtofon fabrikitan de metiistoj. Li starigas monasteran lernejon laŭ Hinda tradicio, kiu restis ĝis la morto fokuso de spirita vivo. De nun, la sinteno de Gandhi, nomita de ĉiuj : Mahatma, aŭ pli familie : Bapu : Patro, estas fiksita.

Lia digneco, asketismo ne malakordiĝis kun konscia bonhumoro. (Kiam oni vidas lin kun kaprino kaj ligna taso veturanta al Londono kun nuda korpo por diskuti en la anglaj palacoj, ĉu tiu miskonsterna komiko ne igas nin pensi al Charlie Chaplin kiu ribeliĝas kontraŭ la kolosa maŝino U.S.A. per la mokrido de l' saĝo?)

La kontraŭulo de l' Britoj, tiom formalistaj kaj ceremoniaj, estis tiu « duonfakiro pri kiu Winston Churchill mire asertis, ke li veturis triaklase en vagonaroj aŭ sur la kurierŝipaj ferdekoj irante de vilaĝo al vilaĝo, de malliberejo al malliberejo nur subtenata de sia ega amo al homo, tamen per fido, kiu detruos la plej potencan imperialismon de l' mondo.

Notindas, ke li estis malfacile imprenebla tiel al insultoj kiel al aklamadoj. Unu post la alia, li enkondukas la « Netuŝebluloj » t. e. pariojn kaj virinojn en la politikan vivon. Belaj Hindaj kaj eĉ Eŭropaj virinoj ne hezitas al si razi la kranion por lin imiti forlasante beleĝajn kaj elegantajn ŝtofojn por vivi kiel li, elitiĝi je la kvara matene por preĝi, vivi per kaprina lakto kaj sin sterni sur la grundo de l' malriĉaj domoj.

Lia prestiĝo estis tiom granda, ke la Anglaj juĝistoj, kiuj lin kondamnis, petis samtempe lian pardonon. En 1922 akuzite esti respondeca pri atenco, estis li mem, kiu konsilis al juĝistoj apliki la leĝon. « Juĝistoj, diris Gandhi, vi ne rajtas elekti : Demisiu aŭ kondamnu min! » Kaj la juĝisto Bromfiel respondas : « Estas neeble ignori, ke laŭ milionoj da homoj inter viaj samlandanoj, vi estas granda patrioto kaj ĉefo. Eĉ tiuj, kiuj ne politike samopinias, konsideras vin kiel homon kun alta idealo, nobla vivo kaj eĉ sankta... »

Gandhi eliris la malliberejon en 1924 kaj estis elektita prezidanto de l' « Kongreso ».

En 1930 nova simbola kampanjo havis profundan efikon. La monopolo de l' salo senigis la Hindojn de nepre necesaĵo. En solena irado Gandhi piediris 150 kilometrojn al maro por mem eltiri salon, tiel perfortante la leĝon. Arestite kaj liberigite, li fine venkis. Li estis akceptita ĉe la vicreĝo dum sep horoj kaj konsentis veturi al Londono mandate de la « Kongreso » por partopreni la konferencon de la « Ronda Tablo ».

Unafoje Londono agnoskis la « Kongreson ». La rimarkigo de alta funkciulo estis karakteriza : « Estas du notindajoj : Unue, Kristo ŝajne tia aspektis. Due, ni neniam povos akordiĝi kun li, tial ke ni ne diskutas sur la sama planO. » De fasto al fasto la Mahatma daŭrigas sian agadon. La dua mondmilito okazas. En 1942 li samtempe prenas pozicion kontraŭ Angloj kaj Japanoj. Gandhi estas denove enkarcerigita en la palaco de la Aga Khan. La 10-an de februaro li komencis la epopean faston, kiu devis daŭri tri semajnojn kaj kies celo estis la liberigo de la ĉefoj de l' « Kongreso ».

Li ekmalsaniĝis kaj sekve la registaro senkondiĉe liberigis lin. Bedaŭrinde la agitado kreskis inter Hindoj kaj Muzulmanoj. Li intervenis per novaj fastoj. En februaro 1947 S-ro Attlee fine proklamas la senkondiĉan sendependecon. Tio estis la granda triumfo de Gandhi. tamen amara triumfo ĉar Hindio estis dividita en du kampoj, kvankam li ĉion faris por tion eviti. Baldaŭ civila milito okazis. La 13-an de januaro 1948 la Granda Mahatma decidas ĝismorte fasti.

Post kvin tagoj la miraklo okazis, kaj paco revenos. Sed tiu momente la apostolo de la « Neperforteco » mortas per la perforteco de fanatika Hindo. Kelkajn horojn antaŭ ol morti, li flustris al sia sekretario : « Povas esti, ke morgaŭ neniam plu brilos! »

Mondo funebras. Bela figuro de nia homaro malaperis. En la momento, kiam sur nia planedo homoj el ĉiuj mediaj interdisputas por konkeri honorojn, postenon, monon, la morto de Gandhi rememorigas al ni, ke ni ne tute malesperu.

Kvankam tiu profunde humana homo ne apartenas al klasbatalaj partioj, kiom respekte ni agnosku lian potencon! Per liaj sufero kaj diplomateco, tiu vivanta Dio multe pli faris ol modernaj armiloj. Ni ege bedaŭru, ke tiu mistika kaj religia popolo dividita en rivalaj kastoj, kelkfoje kruelaj, plejofte sen kulturo, ne ankoraŭ alvenis al matura stadio, kiu permesus forpeli ĉiajn tiraniojn kaj fine evolui al Sociala Revolucio.

MARSO.

KUL